**Hans Michael Maitzen (28.3.1943 Graz - 14.7.2026 Vieno)**
fervora astronomo kaj Esperantisto

En sia tempo ĉe Akademia Gimnazio (1953-1961) en Graz, en 1957 li dum tendaro de la Katolika Gimnazia Junularo konatiĝis kun Klaus Perko, kiu rakontis unuafoje pri Esperanto.

Okaze de la malfermo de la studjaro 1960/61 estis evento ĉe la Katolika Studenta Junularo por novstudentoj de Universitato Graz por ĉiuj studfakoj. Tie li rerenkontis Klaus Perko-n, kiu ree rakontis pri Esperanto. Estiĝis en 1961 Studenta Esperanto-Grupo en Graz, por kiu Perko establis tre sukcesan Esperanto-kurson. Ekde tiu tempo Hans Michael Maitzen estis ankaŭ konata kiel "Miĉjo".

Tiuj studentoj en 1962 partoprenis sub gvido de Maitzen al junulara renkontiĝo de Esperantistoj en Romo, kiuj estis lernintaj la lingvon en la lasta jaro. Sukcesplene ili revenis kaj estiĝis kerno de juna movado en Graz. La rekta atesto pri la lingva kompetenteco atingita en tiel mallonga tempo donis decidan impeton al la plivastigo de studentaj esperantaj agadoj en la sekvaj jaroj, kulminante per la fondo de la Aŭstra Esperanta Junularo (AEJ) en Graz en 1965.

1968-1969 Maitzen estis TEJO-Prezidanto. Samjare al la UK 1970 en Vieno okazis la 26-a IJK en Graz, certe Maitzen kunorganizis ĝin.

En 1973 li edziĝis al Olga, kun kiu li havis kvar filinojn - feliĉa familio - kiu frekventis familiajn renkontiĝojn en Esperantujo. Li fieris, ke ankaŭ nepino parolas la Internacian Lingvon.

Li aktivis unue en la junulara sekcio „La alta flugo“ de IKUE, kaj poste en IKUE, kie li multe kontribuis al la gazeto „Espero Katolika“ de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.

En Vieno li grave kontribuis al la ĝenerala Esperanta vivo. En 1987 konekte al la internacia scienca simpozio „Esperanto 100-jara" li sukcesis reunuigi la Esperanto-movadon en Aŭstrio. 1992 okazis en Vieno la 77-a UK kaj Maitzen estis la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato. Li kunlaboris en la Europa Jaro de Lingvoj 2001 en Vieno. Li kunlaboris en la dua eldono de PIV pri astronomio. Maitzen estis multjara profesoro de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), kaj ĝia prezidanto (2013-2016) kaj senata sekretario kaj kiel profesoro de Akademio Internacia Scienca de la Sciencoj (AIS), - unue laŭ la rajto de la Respubliko de San Marino - multe kontribuis al ties studadsesioj. Li ofte preparis kaj kontribuis al sesioj de Internacia Kongresa Universitato de UEA.

Maitzen estis ĉefreprezentanto de UEA en la Viena sidejo de UN ekde ties fondiĝo en 1979. 2019, dum la 98-a UK Rejkjaviko, oni pro tio honorigis lin kun diplomo pro Elstara Agado de UEA.

En 2010 la kara edzino Olga tro frue mortis kaj de tiam Maitzen funebris pri ŝi.

Dum multaj jaroj ĝis 2019 li servis kiel prezidanto de Aŭstria Esperanto-Federacio, kaj ĝislaste li partoprenis kiel estrarano la interretajn kunsidojn.

Li kun Renardo Fössmeier verkis kelkajn scienc-historiajn librojn en Esperanto. 2019 aperis *La Gregoria kalendara reformo kaj ĝiaj postefikoj*. 2021 aperis la dulingva libro *Vojaĝo de Germana Profesoro al Eldorado*. Tie li esperantigis la germanlingvajn notojn de la fizikisto Ludwig Boltzmann okaze de sia vojaĝo al Usono komence de la 20-a jarcento (1905). 2024 aperis la libro *Pri la rivoluoj de la ĉielaj korpoj*. Ĝi estas esperantigo de la origine latina teksto de Nikolao Koperniko.

En la du lastaj, malsanaj jaroj tamen li partoprenis al tradukado de libroj por IKUE, ekzemple tiu de papo Francisko „Kontraŭ milito. La kuraĝo konstrui pacon“. (2025)

Li tre fieris, ke la 111-a UK okazos en lia deven-urbo Graz.

Maitzen scipovis amike kontakti kun ĉiaj homoj. Tion pruvis lia partopreno en la Aŭstra Televido ĉe la „Nette-Leit-Show“ (Spektaklo de Afablaj Homoj) de dikega „Hermes Phettberg“ (Grasa Monto) kie li respondis demandojn pri astronomio (1995).

Atesto: „Ĉiu renkontiĝo, ĉiu kunestado kun Maitzen estis ĝojiga, riĉiga travivaĵo! Pacienca, helpopreta, ĉiam bonhumura kaj tre kompetenta, ĉu en korpuskla fiziko, astronomio aŭ Esperanto - li restas en memoro kiel plej aminda amiko. Invitite al gimnazio por prelego pri astronomio 90-minuta - fariĝis kvar horoj en plenplena salonego. Uzante kolorajn diapozitivojn de niaj planedoj kaj foraj sunoj, kaj ankaŭ sonkasedojn pri rotaciantaj neŭtronaj steloj kaj galaksioj en interstela spaco, li kaptis la atenton de centoj da lernantoj – kaj ankaŭ de la ĉeestantaj instruistoj – per fascina prelego, prezentita per sia plaĉa, profunda voĉo kaj kun sia trankvila sinteno.

Ĉiu, kiu konis lin, prenis lin en sian koron kaj neniam forgesos lin.

Kaj multaj Esperantistoj mondskale spertis lin tia.

La profesia vivo:

En 1961 Maitzen ekstudis astronomion kaj proksimajn fakojn en la Universitato Graz, kion li finis per promocio al doktoro pri astronomio en 1967. Post tio li fariĝis scienca asistanto pri astronomio ĉe Universitato Bochum en Germanio (1969-1976). Poste li ŝanĝis al Universitato Vieno kie li habilitiĝis en 1980. Ekde 1986 li reprezentis la astronomojn de Aŭstrio en traktado pri „Eŭropa Suda Observatorio“ (ESO). Poste ĉiam denove li profesie laboris en tiu observatorio en la dezerto Atacama en norda Ĉilio. Tie li rapide lernis la hispanan lingvon kaj li bonfartis. En 1989 la federacia prezidento nomumis lin „Eksterordinara universitata profesoro“.

Maitzen ekzemple evoluigis filtril-fotan metodon por malkovri „kemie apartajn magnetstelojn", kiu detektas karakterizan breĉon en la radiado de tiaj steloj ĉirkaŭ ondolongo de 520 nm.

2026-07-15, Karl Reinisch